ZDRUŽENJE ZA ESPERANTO SLOVENIJE | SLOVENIA ESPERANTO LIGO

# INFORMACIJE INFORMOJ

Leto / jaro 11, št. / n-ro 3 | oktober / oktobro 2005

## Srečanje ob Zamenhofovem dnevu v soboto 10. decembra v Sevnici

Letošnje srečanje slovenskih esperantistov ob Zamenhofovem dnevu bo v soboto 10. decembra 2005 v Sevnici v Hotelu Ajdovec pri železniški postaji.

Program srečanja:
10.00 zbor udeležencev
10.30 delovni del
12.00 kosilo (cena 1600 SIT)
14.00 ogled gradu

Prijave sprejemata Janez Zadravec in Ana Ferrer po tel. (01) 505 96 93 do 8. decembra. Prijava je obvezna zaradi rezervacije kosila.

## Verda flago sur Blanka Monto

La unuan de aŭgusto plenumiĝis mia longjara deziro. En societo de malmultaj gesamideanoj mi altiĝis sur la plej altan pinton de Eŭropo. Montgrimpado daŭris tri tagojn, sed la plej interesa parto estis la tria tago.



De la lasta rifuĝejo ni startis je la unua horo matene. Malgraŭ malvarmo de 20 gradoj sub la nulo kaj blovado de forta vento, estis belega nokto. Plena luno, sennuba ĉielo, brilantaj steloj - ni vidis ankaŭ kelkajn falantajn stelojn - rebrilis de la neĝa ĉirkaŭaĵo.

Grandioza estis sento kaj impreso suprengrimpi inter aliaj alpistoj kun fruntaj lumetoj sur niaj kapoj en klara nokto. Modernaj pilgrimantoj.

Post sep horoj ni atingis nian celon. Je la oka matene mi hisis Esperantan verdan flagon sur la pinto de Blanka Monto. Feliĉa homo, kun verda flago, sub lazura ĉielo, ene de mirinda ĉirkaŭaĵo. Ĉu iu ne kredas al mi? Jen la foto! (Slavko Samotorčan el Izola)

## Eŭropa lingvotago kaj Eŭropa Esperanto-tago

La 26-a de septembro estas eŭropa lingvotago kaj eŭropa Esperanto-tago en la landoj aliĝintaj al EU kaj al Konsilantaro de Eŭropo.

En tiu tago okazis io, jam tradiciaj tutpaĝaj anoncoj de Etsuo Miyoshi en kelkaj landoj de EU – en Slovenio en Dnevnik - ĉar ankaŭ en multaj EU-landoj esperantistoj aranĝis agadojn pri Esperanto, pri lingvoj, pri lingvoproblemoj, kaj poste raportis pri ili al la ceteraj esperantistoj kaj ankaŭ al la oficialaj prizorgantoj pri tiu tago en la unuopaj landoj. (Zlatko Tišljar)

## Sukcesa 73-a itala kongreso en Rimini de la 2a ĝis la 7a de septembro

Grandan kaj riĉan aranĝon partoprenis preskaŭ 130 kongresanoj (deko da eksterlandanoj). Dum la antaŭa tago, la 1-an de septembro en la urbo-centro de vasta Salono Podesta okazis la inaŭguro de granda kaj interesa ekspozicio pri du temoj: »Esperanto-informado« kaj »Esperanto en filatelio«. En la unua parto de la ekspozicio, belaspekte aranĝitaj, estis 50 paneloj kun grandaj plurkoloraj bildoj kaj klarigoj pri

Esperanto-movado kaj ĝiaj celoj, pri la favoraj agnoskoj kaj deklaroj de kulturaj kaj sciencaj eminentuloj, informoj pri kongresoj, precipe pri la venontjara 91-a UK en Florenco. En apudaj vitrinoj, oni montris du poŝtmarkajn kolektaĵojn el la tuta mondo.

En la dua parto, en taŭgaj filatelaĵaj vitrinoj, oni montris du poŝtmarkajn kolektaĵojn pri Esperanto kaj filatelio. En Rimina Esperanto-Centro ekspoziciis pri sia ekumena solidara agado por bonfara helpado al la malriĉa popolo de la vilaĝo Tozounme en afrika lando Benino. Jam de kelkaj jaroj, CERRES kunlabore kun IKUE, starigis kontaktojn kun loka afrika esperantisto Gaston kaj oni sukcesis realigi intervenojn por plibonigi la mizeran vivon de la vilaĝanoj per novkonstruado de lernejo, flegejo, profunda puto kun bonkvalita akvo.

Ĉe la kongresejo, en la komforta Hotelo St. Gregory en San Giuliano Mare-Rimini, disvolviĝis la rutinaj kongresaj laboroj kaj kunvenoj. La inaŭguro okazis en la Rimina Provinca kunveneja salono kun la ĉeesto de la urbestro Alberto Ravaioli (kies patro lernis Esperanton), kaj de la Vicministro pri Eksteraj aferoj (iama eŭropa parlamentano) Gianpaolo Bettamio.

En la preĝejo de Sanktuloj Paŭlo kaj Johano (la katedralo de la esperantistoj pro la ornamitaj artvaloraj mozaikaĵoj kun la Esperantaj kaj italaj tekstoj), Pastro Duillio Magnani celebris en Esperanto la Meson kun belaj kantoj.

Fani Rižnar kun longjara esperantisto Giuseppe Bergamini el Mirandola unu tagon partoprenis kongreson kaj trarigardis vere grandan kaj riĉan aranĝon, precipe plaĉis al ni la preĝejo de sanktuloj Paŭlo kaj Johano, neforgeseble, mi tiun vidis la unuan fojon.

Mi lasis por s-ano Mario Amadei paperon skribitaj kun salutvortoj por ilia kongreso en nomo de slovenaj esperantistoj. (Mario Amadei kaj Fani Rižnar)

## 90-a Universala Kongreso en Litovio

Ĉijare la UK-on gastigis lando, kies loĝantaro estas unu el la plej esperantemaj en la mondo: inter la 2344 partoprenintoj el 62 landoj estis preskaŭ 500 el Litovio. El Slovenio ĉeestis du: Zlatko Tišljar el Maribora Asocio por Eŭropa Konscio kaj la subskribinto de tiu ĉi raporto Tomaž Longyka. Bedaŭrinde, la tria aliĝinto - nia prezidanto Janez Jug - ne povis partopreni pro grava lezo de ŝultro en trafika akcidento.

Alta protektanto de la UK estis la prezidanto de la litova respubliko Valdas Adamkus. Bedaŭrinde li ne povis mem alparoli la gekongresanojn, sed faris tion en lia nomo la litova ministro pri eksterlandaj aferoj Antanas Valionis. La plej grava mesaĝo en lia parolado estis la konstato: »komunumo de internacia esperantistaro estas perfekta ekzemplo de solidareco inter homoj de diversaj nacioj. Via movado kontribuas al pliproksimiĝo de amaskomunikiloj«. Laŭ la Kongresa kuriero »evidentiĝis, ke la alta protektanto de la kongreso dimanĉe, la 24an de julio, preferis la finalon de Eŭropa Atletika Ĉampioneco en Kaunas, kiun partoprenas 45 landoj, kaj ne la Universalan Kongreson de Esperanto, kie kunvenis delegitoj el 62 landoj, kaj kies alta protektanto li estis nomumita«.

Pli entuziasmigis la gekongresanojn la urbestro de la ĉefurbo Vilno Arturas Zuokas. Li ne nur alparolis nin dufoje, li eĉ invitis grandan nombron de gekongresanoj en la urbodomon al solena akcepto kun kultura programo.

La urbestro ŝajnas esti granda subtenanto de esperantistaj klopodoj. Dum la akcepto li interparolis ankaŭ kun la subskribanto, kiu proponis al li ĝemeliĝon de Ljubljana kaj Vilno, kaj li agnoskis, ke tio povas esti interesa. Kaj la esperantistoj povus ludi gravan rolon en tio. Restas nur, ke la urbestrino de Ljubljana eksciu ion pri tio. Ŝi eble povus eĉ entuziasmiĝi.

Okazintaĵoj, kiuj rekte rilatas al Slovenio: Zlatko Tišljar estis elektita kiel sekretario de la Eŭropa Esperanto Unio, Janez Jug estis elektita de la Komitato de UEA kiel membro de la elektoprepara komisiono por prepari la elekton de estraro de UEA en la jaro 2007. Tomaž Longyka sukcesis en la intemacia meznivela lingva ekzameno kaj sukcese partoprenis la bazan seminarion por instruistoj de Esperanto laŭ la metodo Cseh.

Okaze de la jubilea UK la Komitato de UEA elektis ok novajn honorajn membrojn: Roman

Dobrzynski el Polando, Ursula Grattapaglia el Brazilo, Heta Kesala el Finlando, Boris Kolker el Rusio, Telesforas Lukoševičius el Litovio, Duilio Magnani el Italio, Stevens Norvell el Kanado kaj Andrzej Pettyn el Pollando.

Se en Pekino lastjare gekongresanoj disiris doninte al la mondo la Pekinan deklaron, kiu proponis novan internacian lingvan ordon, la Vilna deklaro estis malpli batalema - ĝi fakte nur emfazis la grandan rolon de universalaj kongresoj por la esperantismo. (La temo de la Vilna UK estis: »Universalaj kongresoj«). Sed la vera fino de UK okazis nur post la kongreso - dum la Nitobe-simpozio. La konkluda dokumento de tiu simpozio povus fariĝi grava mejloŝtono en la Esperanto-movado kaj en la lingvopolitiko en EU kaj en la tuta mondo. En la sekvontaj Informoj la konkluda dokumento kaj la okazintaĵoj rilate al tiu simpozio estos pli vaste pritaktitaj.

Vi povas vidi la dokumenton sur la retpaĝo: http://www.esperanto.org./nitobe 2005.htm.

Sveiki! = Saluton! Laba diena! = Bonan tagon! (de Tomaž Longyka)

## Esperantistoj el 10 landoj en MKR de la 22-a ĝis la 25-a de septembro 2005

La ĉijaran Montkabanan Renkontiĝon sur la monto Velebit en Kroatio partoprenis 35 esperantistoj el 10 landoj (AT, SI, HR, DE, ES, SK, CZ, HU, IT, SE). Dum la 4 tagoj oni havis neforgeseblajn ekskursojn al deko da montpintoj inter 1100 kaj 1450 m kaj vespere gajajn amuzajn ludojn, diskutojn, babilojn. Estis faritaj sennombraj fotoj, kies parteton vi povos baldaŭ vidi sur Ia hejmpaĝo de MKR.

Pretigu vin por la printempa familia MKR en Kroatio kaj sekvajara aŭtuna MKR en Slovenio. Dankon al organizantoj el Kroatia E-Ligo Vanja Radovanović kaj Mea Bombardelli.

De Zlatko Tišljar

La interligvistikaj studoj en Pollando altiras pli kaj pli da gestudentoj

Inter la 26a kaj 30a de septembro 2005 okazis la unua sesio por la nova] gestudentoj, de la postdiplomaj Interligvistikaj Studoj de UAM (Universitato Adam Mickiewicz), en Poznan. 27 kandidatoj el 13 landoj aliĝis al la trijara ekstera studado, kiu postulas surlokan partoprenon nur dum unu intensa semajno ĉiusemestre, kaj tion sekvas hejma laboro kaj reta konsultado. La multnacia partoprenantaro ebligis interesajn interkulturajn komparojn. El Slovenio enskribiĝis por la studoj du studentoj: Slavko Samotorčan kaj Tomaž Longyka.

La unua semestro konsistis el la kursoj pri komunikado (Ilona Koutny), enkonduko en Esperantan kulturon (Zbigniew Galor), esperanta literaturo de la unua periodo (Lidia Ligeza kaj Tomasz Chmielik) kaj interlingvistiko 1 (Vera Baradovska-Frank kaj Detlev Blanke). La kurson pri kulturo kompletigis la prelegoj pri E-a teatro (Zofia Banet-Fornalowa), pri E-a muziko (Floreal Martorell) kaj pri E-aj filmoj (Roman Dobrzynski) okazintaj jam enkadre de la semajnfina kultura renkontiĝo ARKONES. Dum la sama semajno tri finstudintoj faris sukcesan finekzamenon defendante sian diplomlaboraĵon pri metodiko de Katalin Kovats: Alain Delmotte (Belgio): Analizo de vortprovizo en kvar lernolibroj; Iwona Kocieba (polino el Belgio): Instruado de akuzativo; Monika Molnar (hungarino el Svislando): Muziko en la instruado.

La tradiicia septembra festivalo de esperanta kulturo ARKONES (ARtaj KONfrontoj en ESperanto) atendis la diligentaj gestudentojn per multe da elstara muziko (JoMo, Paulo Mojĉajev, Natalia Strijžnova, Yas Kawamura, Moliere Ngangu, Robert von dem Borne, la bandoj Dolchamar kaj Krio de l'morto) kaj per aliaj kulturaj eventoj: de diverstemaj prelegoj tra oratora konkurso ĝis teceremonio. (d-rino Ilona Koutny, akademiano, Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj)

## 50-a jarreveno de la Universala kongreso de Esperanto en Bologna

La unuan de oktobro 2005 geklubanoj kaj geamikoj de la najbaraj urboj festis la publikan renkontiĝon pri la 50-a jarreveno de la Universala kongreso de Esperanto en Bologna. (Mario Amadei)

## 100-jariĝo de la Esperanto-grupo »Luigi kaj Carolina Minnaja

La Esperanto-grupo »Luigi kaj Carolina Minnaja centjariĝis kaj la grupanoj organizos en Romo de la 8-a ĝis la 11-a de decembro 2005 oficialan ceremonion en la Ĉefsalono de la Kapitolo (la urbadomo) kaj seminarion lingvan kaj muzikan vesperon kaj turismadon tra la urbo taga kaj nokta! Loĝebleco en dulitaj ĉambroj, je 800 metroj de Vatikano, tre favorpreze: 60 eŭroj (tranokto kaj tri manĝoj). Sinanoncojn kaj informojn adresu al Michaela Lipari: michela.lipair@tiscali.it

| Iz slovenskega tiska | DELO, *17. oktobra 2005, stran 13* |
|---|---|

## Pet točk za evropsko večjezičnost

Na simpoziju Nitobe v Vilniusu v Litvi so se zbrali interlingvisti in drugi strokovnjaki, ministri, predstavniki evropskih parlamentov in diplomati iz skoraj tridesetih držav, tudi iz Slovenije. To je bila priložnost, da so se politiki in strokovnjaki pogovarjali o jezikovnem sporazumevanju v EU. Izhodišče je bila splošna ugotovitev, da vprašanja večjezičnosti v Evropi ni več mogoče reševati brez sistematičnega pristopa, ki bo tudi finančno podprt. Le tako bo mogoče preprečiti, da bi jezikovne in kulturne vrednote manjših držav in nedržavnih jezikovnih skupin postale ogrožene.

Udeleženci so za javnost izdali sklepno listino, ki bi jo lahko uporabili kot okvirni program za nadaljnje delo v EU. V njej med drugim piše, da je pogoj za nemoten proces evropskega združevanja pravično, demokratično in kakovostno sporazumevanje med vsemi Evropejci. Sedanja jezikovna politika v institucijah EU in državah članicah je povsem neprimerna in tega ne omogoča. V listini ugotavljajo, da so zaradi ogromnih ekonomskih in političnih bremen resno ogroženi jeziki manjših držav in je zato nujno takoj ukrepati.

V sklepni listini je naštetih pet torišč, na katerih je treba najti jezikovnopolitične rešitve: profesionalno sporazumevanje med institucijami EU in znotraj njih; uradno sporazumevanje med institucijami EU na eni ter državljani in oblastmi držav članic na drugi strani; upravljanje jezikovne politike v posameznih državah EU pod vodstvom parlamentov; zunanje sporazumevanje institucij EU in članic z neevropskimi državami in mednarodnimi organizacijami.

Najpomembnejši del listine v petih točkah nakaže, kaj bi morali podrobneje opredeliti ali storiti: preučiti različne modele večjezičnosti po svetu; opredeliti in zagovarjati status in potrebe malih nacionalnih in manjšinskih jezikovnih skupnosti v EU; razviti tak jezikovnopolitični okvir, ki bi onemogočil, da bi katerakoli široko uporabljana *lingua franca* spodkopala vitalnost nacionalnih jezikov; raziskati možno vlogo esperanta v jezikovnem okviru EU; načrtovati razvoj in vpliv jezikovnih in sporazumevalnih tehnik.

Tomaž Longyka

| Iz slovenskega tiska | |
|---|---|

## Nova retejo de SIEL

Slovenia Esperanto ligo havas novan retejon de septembro.

**http://www.esperanto.si**

Vizitu ĝin kaj aliĝu.

**INFORMACIJE / INFORMOJ** izdaja / eldonas Združenje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Tavčarjeva 2/I, p.p. 1643, SI-1001 Ljubljana, Slovenija. / Slovenio. Matična št. / kodnumero 5058384. ID za DDV / n-ro por AVI: SI93737777. Transakcijski račun / bankkonto: 02015-0012704490 pri / ĉe Nova Ljubljanska banka d.d.. (Bankkonto por eksterlando: SI56020150012704490 ĉe Nova Ljubljanska banka d.d., Swift-kodo: LJBASI2X)